voko el stirio

Bulteno de la Esperanto-movando en Stirio kaj de la Esperanto-Societo "Unueco" Graz

Mitteilungsblatt der Esperanto-Bewegung der Steiermark und des Esperanto-Vereins "Einigkeit" Graz

N-ro 380 **marto / März 2026** ZVR 473841603

Warum Ron Winteraeken die Welthilfssprache Esperanto lernte

Der Niederländer ist fasziniert von der 1887 geschaffenen Weltsprache. Er liest Bücher auf Esperanto und spricht die Sprache. Aber wozu? Und was ist mit der Initiative, den Vaalserberg in Monto Zamenhof umzubenennen?

Wie schön wäre es, wenn die Menschen überall auf der Welt dieselbe Sprache sprechen könnten. „Sprache schafft Verbindung“, weiß Ron Winteraeken. Und genau das hatte Ludwik Lejzer Zamenhof, der Esperanto-Erfinder, vor rund 150 Jahren mit seiner Brückensprache im Sinn: buchstäblich eine Brücke zwischen den Menschen zu schlagen.

„Man muss das im Geist der Zeit sehen“, erklärt Winteraeken. „Heute ist das Englische so dominant, dass die Leute nicht so schnell auf die Idee kommen, eine neutrale Sprache zu schaffen.“ Damals war die Welt noch ein bunter Flickenteppich von Sprachen und es war nicht so einfach, sich in einem anderen Land oder Sprachraum zu verständigen.

Die universelle Weltsprache, die Zamenhof sich vorstellte, ist Esperanto dennoch nicht geworden. „Aber wie besonders ist es, dass die Sprache weltweit noch lebendig ist? Ich finde es faszinierend, dass es überall Menschen gibt, die noch Esperanto sprechen.“ Menschen wie Winteraeken selbst. Denn mittlerweile beherrscht er die Hilfssprache recht gut. „Ich fühle mich in Esperanto ziemlich wohl“, sagt er. Das liegt unter anderem an der seiner Meinung nach überraschend einfachen Struktur der Sprache.

Denn knifflige Konjugationen, Fälle und alle möglichen seltsamen Ausnahmen von diesen Regeln gibt es in Esperanto nicht.

„Es ist sehr logisch. Das Verb ‚lernen' im Präsens heißt zum Beispiel ‚lernas' und egal ob ich, wir oder sie, es heißt immer ‚lernas'." Damit kann man in Esperanto nie einen entsprechenden Endungsfehler machen. „Und so enden Substantive immer auf ein o", schildert er weiter begeistert. „‚Arbo' für Baum zum Beispiel, ‚skribilo' für Stift. Mit verschiedenen Präfixen und Suffixen kann man aus diesen Grundwörtern ein ganzes Arsenal an neuen Wörtern machen."

Winteraeken hat auch ein Faible für Sprachen. Nachdem er jahrelang in der Pharmabranche gearbeitet hatte, absolvierte er vor einigen Jahren eine Ausbildung zum Dolmetscher/Übersetzer in Maastricht. Heute arbeitet er freiberuflich als Übersetzer. „Wenn man eine andere Sprache spricht, erweitert man seine Welt". Die Sprache öffnet also die Tür zu neuen Kulturen." Und das gilt auch für Esperanto. weiß er jetzt.

Denn das ist die Frage, die unwillkürlich ein wenig auftaucht, wenn man über Esperanto spricht: Was nützt es überhaupt? „Dass ich hier auf der Straße jemanden treffe, mit dem ich Esperanto sprechen kann, diese Chance ist sehr gering", muss Winteraeken zugeben. „Aber ich habe schon viele interessante Menschen durch Esperanto kennengelernt." Weltweit, denn es scheint eine richtige Weltgemeinschaft von Esperantisten zu geben. „Es gibt nationale Verbände, Kurstage, Vorträge. Es werden Bücher auf Esperanto geschrieben, es wird auch Musik gemacht. Aber ich war zum Beispiel auch schon zweimal auf dem Esperanto-Weltkongress." Die Einfachheit des Esperanto hilft Winteraeken auch, andere Sprachen leichter zu verstehen.

Der Gronsvelder selbst bezeichnet sich übrigens nicht als Esperantist: Ich bin eher ein Esperanto-Sprecher." Als Esperantist strebt man auch den Weltfrieden und die Verbindung an, so wie es Zamenhof wollte. Mir gefällt diese Idee, aber für mich geht es in erster Linie um die Sprache." Wegen dieser großen Ideale sind übrigens einige Esperantisten der Meinung, dass Zamenhof unbedingt eine Statue verdient hat. Oder einen Berg: Eine Initiative fordert gerade, den Vaalserberg in Monto Zamenhof umzubenennen. Mit dem Dreiländereck als Symbol der Verbindung.

Eine Initiative sammelt derzeit im Internet Unterschriften, um den Vaalserberg, auf dem der Dreiländerpunkt liegt, in Monto Zamenhof beziehungsweise in Zamenhofberg umzubenennen. Der Ort besitzt laut den Initiatoren ein außergewöhnliches Potenzial, ein Symbol internationaler Verbundenheit zu werden. Der Vaalserberg ist mit 322 Metern die höchste Erhebung der Niederlande auf dem europäischen Festland. Gleichzeitig soll mit dem Namen auch an das Engagement einer Gruppe erinnert werden, die Anfang des 20. Jahrhunderts versuchte, aus dem damals neutralen Territorium Neutral-Moresnet den ersten Esperanto-Staat der Welt namens „Amikejo" zu formen. Aktuell hat die Online-Petition mehr als 700 Unterschriften. (lib)

Gesendet von Mag. Walter Klag mit esperanto@chello.at.

La sento de relativa supereco

Psikologiistoj eltrovis multajn erarajn pensomanierojn ĉe la homoj. Oni nomas ilin "kognaj biasoj". Tiuj misaj penso-manieroj kondukas nin malbone juĝi aŭ pensi aferojn, aŭ mallogike interpreti faktojn. Unu el tiuj biasoj estas la sento de relativa supereco, kiun oni ankaŭ nomas "biaso de supereco". La plejmulto de homoj pensas, ke ili malpli ofte misjuĝas ol aliuloj. Oni rekonas ke aliuloj mense eraras, sed oni ne konscias, ke ankaŭ ni mem eraras. Oni plejofte certas esti pli lertaj kaj kapablaj ol aliuloj.

Oni aparte elmontris tiun fakton ĉe kuracistoj ekde la 1990-aj jaroj. Oni demandis al 105 medicinaj studantoj, ĉu ili pensis ke la kuracilaj vendistoj, kiuj ofte vizitas ilin, influas iliajn personajn manierojn preskribi kuracilojn. Poste oni demandis al ili ĉu tio influas la preskribajn manierojn de iliaj kunlaborantoj kaj kun-studantoj. La studantoj havis 4 respondeblojn : tio ne influas, tio iome influas, tio duone influas, tio multe influas. 60 % de la studantoj respondis ke la vendistoj ne influas iliajn proprajn preskribajn manierojn, sed nur 20% respondis ke la vendistoj ne influas la preskribajn manierojn de iliaj kun-laborantoj. Inverse, nur 5% pensis ke la vendistoj influas duone aŭ multe iliajn proprajn preskribajn manierojn, dum 30 % pensis ke tiuj vendistoj influas duone aŭ multe la preskribajn manierojn de iliaj kunlaborantoj

Resume, la medicinaj studantoj do pensas ĝenerale ke ili estas malpli influeblaj ol siaj kunlaborantoj. Ili estas viktimoj de la biaso de supereco. Oni kompreneble retestis tion dum la postaj jaroj, ankaŭ ĉe kuracistoj, kaj en diversaj landoj. La rezultoj ĉiam similas.

Oni ankaŭ pritraktis la demandon: ĉu vere tiaj vendistoj influas la kuracistojn? Kaj la respondo estas jesa: ju pli kuracisto renkontas vendistojn, des pli alta estas la probableco, ke la kuracisto pli preskribas, kaj malpli bone preskribas. La sento de relativa supereco aperas en multaj diversaj kuntekstoj. Ekzemple, oni ĝenerale pensas ke oni plibone kondukas aŭtojn ol aliuloj, aŭ ke oni estas pli popularaj ol niaj amikoj. Tio, kion oni ne scias, estas : ĉu kiam oni konas la ekziston de tiu kogna biaso, oni pli konscias niajn mensajn erarojn?

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis ***Nelly Durbois*** *el* ***Francio*** *en Esperanta retradio.blogspot.com, http://aldone.de/retradio.*

Urboj sen mono: ĉu ili funkcias?

Imagu vilaĝon kie oni ne devas pagi por lui domon. Aŭ urbon kie laboro ne temas pri profito, sed pri bezonoj de ĉiuj. Ĉu tio sonas kiel utopio? En kelkaj lokoj tra la mondo, homoj efektive provis vivi tiel: sen mono, aŭ kun mono en tute alia rolo ol kutime.

Unu ekzemplo estas Christiania, kvartalo en Kopenhago, Danio. En 1971, grupo da homoj okupis forlasitan militistan instalaĵon kaj deklaris ĝin libera urbo. Ili volis krei komunumon bazitan sur kunvivado, memregado kaj senpaga uzo de rimedoj. Ekzemple, domoj ne estis vendataj; oni povis simple loĝi tie, se oni respektis la regulojn de la komunumo. Ankaŭ komerco estis limigita. Kompreneble, dum la jaroj aperis konfliktoj kun la dana registaro, sed Christiania ĝis hodiaŭ ekzistas kiel eksperimento de alternativa socio.

Alia interesa ekzemplo estas la hispana vilaĝo Marinaleda. Tiu vilaĝo, situanta en Andaluzio, estis tre malriĉa ĝis la 1980-aj jaroj. Tiam la loĝantoj organizis protestojn kaj okupojn por akiri aliron al teroj de grandaj bienoj. Post jaroj da luktado, ili sukcesis. Hodiaŭ, la vilaĝo havas kolektivan agrikulturan sistemon: ĉiuj laboras sur komuna tero, kaj la enspezojn oni disdonas egale. La vilaĝo havas tre malaltan senlaborecon, kaj la lupago por domo estas simbola sumo de 15 eŭroj monate. La urbeto ankaŭ investas en kulturaj kaj edukaj servoj, sen la celo de profito.

Kompreneble, tiuj sistemoj ne estas perfektaj. Christiania alfrontis problemojn pri drogkomerco kaj ekskluziveco. Marinaleda dependas de subvencioj kaj havas fortan gvidadon, kio ne ĉiam plaĉas al ĉiuj. Sed la fakto ke tiuj lokoj ekzistas kaj funkcias, almenaŭ parte, montras ke aliaj vivmanieroj eblas.

Kio allogas homojn al tiaj lokoj? Verŝajne la ideo ke oni povas vivi sen la konstanta premo de mono, konkurenco kaj konsumado. Anstataŭe, oni laboras kune por komunaj celoj, dividas respondecojn kaj decidojn, kaj provas krei pli justan socion.

Ĉi tio ne signifas ke ĉiuj urboj devas tuj forĵeti monon. Sed eble ni povas lerni ion de tiuj alternativaj modeloj. Eblas repripensi, kiujn valorojn ni vere volas ke nia socio subtenu: ĉu maksimuma profito por kelkaj, aŭ digno kaj stabileco por ĉiuj? Do la demando restas: se tiaj lokoj povas funkcii, kial ne estu pli da ili?

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis
Aaron Chapman el **Kanado**
en Esperanta retradio.blogspot.com, http://aldone.de/retradio.

KLUBVESPEROJ

Ĉe niaj venontaj klubvesperoj ni parolas pri klubaj necesoj kaj ne nur volas daŭrigi la planadon de nia 111-a UK, sed precipe ankaŭ paroli pri amuzaj aferoj kiel ekzemple ludoj, kiujn Norina jam prezentis. Kompreneble mi plue informos pri kurantaj intertraktoj. Se vi havas ideojn por interesaj program-punktojn kiujn ni povas realigi, mi petas informi nin.

***2-a** de **marto**.*

*Ĉar la 6-a de aprilo estas paska lundo ni kunvenas unu semajno pli malfrue je la **13-a** de **aprilo.***

4-a** de **majo.

1-a** de **junio.

Ni ĝojegas revidi vin en malnova vigleco. Kun koraj salutoj via Ewald.

***Loriot**, naskita kiel Bernhard-Viktor Christoph Karl von Bülow 1923-2011*

„Precize oni povus diri, ke vi senarmigis lin.“
Karikaturo de mia amiko Jim Unger en la usona taggazeto „Washington Post“

* *Impressum* *

Esperanto

Mitteilungsblatt des Grazer Esperanto-Vereines Esperanto-Societo Stirio „UNUECO“
Für den Inhalt verantwortlich:
Dr. Heinz-Paul Kovacic
Panoramagasse 3, 8010, Graz
Tel. 0664 3264027
heinz-paul.kovacic@aon.at

Geno-miksiĝo en Brazilo

Brazilo estas vasta lando, kun du apartaj karakterizaj trajtoj. Unue, ĝia popolo enhavas unu el la plej grandaj miksiĝoj de genoj. Komence, al la indiĝena praloĝantaro alvenis la blankaj portugaloj, poste la nigraj afrikanoj, sklavigitaj (dum tri jarcentoj oni enportis kvar milionojn da nigraj sklavoj!). Laŭ la pasado de tempo, multaj migrintoj alvenis, el Eŭropo, Mezoriento kaj Azio. En tiu granda kaldrono miksiĝis do genoj de popoloj el multaj mondopartoj. Nuntempe, ĉiu brazilano estas rezulto de granda vario de prauloj.

La dua trajto estas, ke en Brazilo troviĝas relative multaj multaĝuloj. Ĝis la monato aprilo 2025, en Brazilo vivis la plej aĝa virino en la mondo, nome 116-jara monaĥino.Tiumomente, aliaj tri brazilaj homoj estis la plej maljunaj en la mondo. Laŭ internaciaj statistikoj, tri el la dek viraj super-multaĝuloj (pli ol 110-jaraj) estas brazilanoj. En Brazilo, nuntempe troviĝas 37 mil centjaruloj, laŭ la censo en la jaro 2022.

Ĉu ekzistas ia rilato inter tiuj du trajtoj de la brazila popolo? Sciencistoj nuntempe intense studas la genetikan strukturon de la brazila loĝantaro, kun la hipotezo, ke eble la genomiksiĝo influas la longvivecon. En la Universitato de Sanpaŭlo la fakuloj en la projekto “Genoma“ analizas la genetikan materialon de preskaŭ 200 brazilanoj pli ol 100-jaraĝaj. El tiuj, 20 estas pli ol 110-jaraĝaj.

Provizoraj datumoj montris pli ol 8 milionojn da genetikaj variaĵoj, kiuj ne troviĝas en internaciaj kolektoj de datumoj. Laŭ la klarigo de D-rino Mayana Zatz, estro de la esplora skipo, “Homo, kiu devenis de tia miksaĵo eble akumulis plurajn protektajn variaĵojn el malsamaj etnoj. Ĉi tiuj estas unikaj variaĵoj, nevideblaj en popolgrupoj genetike pli homogenaj.”

Krome, la genoj ne funkcias izole, sed ligitaj al aliaj molekulaj sistemoj. Oni trovis, ke ili influas la imunologian sistemon. En individuoj tendencaj al longa vivo, okazas daŭra konservado de la imuno-defendoj de la korpo, kiuj ĝenerale perdiĝas laŭ la pasado de la tempo. Ili longe renovigas sian defendokapablon kontraŭ infektoj kaj kanceraj ĉeloj.

Kompreneble, longviveco ne dependas nur de la genoj. Ankaŭ la dieto kaj la korpekzercoj forte influas. La brazila kutima dieto, kiu enhavas fazeolon, rizon, viandon kaj salaton estas konsiderata same saniga kiel la monde laŭdata mediteranea dieto. Laŭ la opinio de D-rino Mayana, la mediaj faktoroj (ĝustaj dieto kaj korpaktiveco) estas decidopovaj ĝis la aĝo de 90 jaroj. Post tio, plej forte influas la genetiko.

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis **Paŭlo S. Viana** el **Brazilo**
en Esperanta retradio.blogspot.com, http://aldone.de/retradio

De mokata ideo al scienca vero

Ĉu vi iam rimarkis, ke iuj ideoj ŝajnas tiel strangaj, ke homoj tuj ridas pri ili, sed poste la sama mondo subite traktas ilin kiel memkompreneblajn? La historio de scienco estas plena je tiaj momentoj. Foje oni nomas ion “sensencaĵo” aŭ “fantazio”, ne ĉar ĝi nepre estas falsa, sed ĉar ĝi ne kongruas kun tio, kion la plimulto jam kutimis kredi. Kaj tamen, post jaroj aŭ jardekoj, la pruvo amasiĝas, la bildo ŝanĝiĝas, kaj la iam ridinda propono fariĝas nova fundamento.

Ekzemple, dum longa tempo multaj kleruloj rifuzis akcepti la ideon, ke malsanojn povas kaŭzi nevideblaj mikroorganismoj. Estis pli komforte kulpigi “malbonan aeron” aŭ nebulajn influojn. La penso, ke io nevidebla povus transdoni febron de unu homo al alia, ŝajnis al iuj tro simpla, preskaŭ infaneca. Sed kiam oni komencis observi pli atente, eksperimentadi, kompari malsamajn kazojn, evidentiĝis, ke higieno, steriligo kaj pura akvo havas rektan rilaton al malsaniĝo kaj resaniĝo. La ideo, fine helpis savi sennombrajn vivojn.

Simile interesa estas la historio pri meteoritoj. Hodiaŭ estas normale diri, ke ŝtonoj falas el la ĉielo. Sed iam tio ŝajnis kontraŭa al “bona” kosmologio: kiel povus rokoj simple flugi tra la spaco kaj subite frapi la teron? Multaj fakuloj supozis, ke homoj konfuzas aferojn, aŭ ke tiuj ŝtonoj ja devenas de vulkanoj aŭ fulmoj. Nur kiam kolektiĝis sufiĉe da fidindaj atestoj, kaj kiam oni komencis analizi la materialon mem, la rezisto malfortiĝis. La ĉielo, iusence, fariĝis pli granda ol antaŭe.

Alia ekzemplo estas la moviĝo de kontinentoj. La ideon, ke la terpecoj, kiujn ni nomas kontinentoj, iam estis kune kaj poste iom post iom disiĝis, oni dum jaroj rigardis kiel tro aventureca. Oni demandis: kio povus movi tutajn landamasojn? Sen klara mekanismo, multaj ne volis aŭskulti. Sed la mapoj, la similecoj inter marbordoj, la fosilioj, kaj poste la malkovroj pri la oceana fundo kaj tektonaj platoj, iom post iom konvinkis. La demando ne plu estis “ĉu ili moviĝas?”, sed “kiel precize ili moviĝas?”

Kion ni lernas el tiaj rakontoj? Ke scienco ne estas nur kolekto de faktoj, sed ankaŭ homa komunumo kun kutimoj, supozoj kaj foje obstino. Skeptiko estas utila, sed ĝi povas fariĝi mallarĝa se ĝi rifuzas eĉ rigardi la pruvojn. Samtempe, ne ĉiu nekutima ideo poste montriĝas ĝusta. La diferenco estas simpla, sed grava: vera ideo kapablas travivi bonajn demandojn. Ĝi ne timas kontrolon, ripeton, kontraŭ-argumentojn. Kaj kiam ĝi finfine staras firme, ĝi instruas al ni ion humilan: la mondo ne devas adaptiĝi al niaj intuicioj. Ni devas lerni adapti niajn intuiciojn al la mondo.

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis
Aaron Chapman el **Kanado**
en Esperanta retradio.blogspot.com,
http://aldone.de/retradio.

Imuniĝi kontraŭ sensencaĵoj

Kiel povas esti haltigata la disvastiĝo de falsaj novaĵoj? Psikologoj prezentas specon de vakcino kontraŭ misinformoj.

Misinformoj disvastiĝas kiel infektantoj. Kiel virusoj ili atakas homojn kaj venenigas la politikan diskurson. La infektanto pri falsaj novaĵoj trairas la sociajn retojn kiel epidemio kaj iniciatas pandemion de malfido. Koncerne la serĉadon de terapioj nun psikologoj de la universitato de Kambriĝo eksplicite referencas al strategioj en la batalo kontraŭ infektaj malsanoj.

Ĉu ne estus grandiozaĵo, tiel la esploristoj demandas en faka magazino, se la pensado de la homo povus esti protektata per speco de vakcino kontraŭ la influo de misinformoj? Ili testis tiun koncepton imunizante partoprenantojn de la testo per etaj porcioj da informoj kvazaŭ kontraŭ sekvaj misinformoj. Se oni disponigas al la publiko unue mallongajn kaj laŭeble konkretajn eldirojn, kiuj enordigas la kredindecon de fonto, tiam tio reduktas la konvinkopovon de falsaj eldiroj.

La principo de vakcino konsistas el tio, veki rezistajn fortojn enlasante al organismo etajn kvantojn da infektanto - kompreneble sen risko de danĝero ke la malsano vere povas manifestiĝi. "Nia ideo estas provoki kognan imunrespondon tiel ke okazas rezisto kontraŭ misinformoj."

La esploristoj testis la koncepton prenante eldirojn pri la klimata ŝanĝo kies ekzisto estas neata precipe en Usono de multaj homoj. Se la psikologoj alportis al la testantoj tiun korektan informon, laŭ kiu 97 procentoj de la sciencistoj konsideras la klimatan ŝanĝon kiel realaĵon, tio igis eĉ skeptikulojn ekdubi. Se tiuj tamen sekve legis la falsajn eldirojn de lobia grupo, laŭ kiu 31000 sciencistoj subskribis peticion ke la klimata ŝanĝo estas mensogo, la efiko de la vera eldiro denove forvaporiĝis. Se la psikologoj unue nutris la testantojn per koncizaj eldiroj pri la lobia grupo de kiu originas la mensogo, la bildo ŝanĝiĝis. Nun ankaŭ neantoj ekdubis kaj rifuzis kun pli alta probableco mensogojn se tiaj alvenis ĉe ili.

Ĉu tiu procedo nun vere estas priskribebla kiel "vakcino". Nu tio sonas jam sufiĉe kiel malproksimaĵo. Sed la studaĵo montris denove: Simple ne sufiĉas marki misinformojn kiel falsaj por ke veraj faktoj denove estu konvinkaj. Anstataŭ tio eble konkrete formulitaj avertoj povus helpi ĝeni la epidemian inundon de la falsnovaĵa viruso.

Tiu-ĉi sonartikolo estis skribita de ***Mag. Anton Oberndorfer*** *en Esperanta retradio.blogspot.com.*
http://aldone.de/retradio